Klarigo : Jam dum kelkaj jaroj la konsilanta sistemo apenaŭ aŭ tute ne funkciis kaj vane ni klopodis revivigi ĝin. La restantaj du linioj de par. 19 kune par. 20 lasas ĉian eblon enoficigi specialajn propagandistojn en ĉiu provinco.

Redakcia Sciigo

La nederlandaj doganistoj en Baarle-Nassau konfiskis ĉiujn ekzemplerojn de la januara numero, ĉar ili erare kredis, ke temas pri kontrabando de devizoj. Ni petas pardonon pro la longa prokrasto, kiu rezultas el tio.

ASOCIA JARRAPORTO 1949

Se ni mezurus la farton de nia movado nur laŭ la kresko aŭ malkresko de nia membronombro, ni devus konkludi, ke la pasinta jaro ne estis tre favora por nia movado. Kiel kutime pluraj anoj pasintjare forlasis niajn vicojn, kelkaj eĉ nepaginte siajn ŝuldojn, kaj la aliĝo de novaj anoj rezulte de aranĝitaj kursoj nur parte kompensas tiun membronombro. Pluraj sekciaj estraroj sendis al ni raportojn, en kiuj ili esprimis seniluziigon pro la raktoj ke ĉiuj klopodoj pri aranĝo de kursoj plene aŭ grandparte fiaskis kaj ke la konversaciaj vesperoj estis malbone vizitataj kaj ĉeestataj ofte nur de la estraranoj, vane atentantaj aliajn samideanojn. Ne mirige do, ke kelkaj estraranoj demandis al ni, ĉu ne estus pli bone likvidi la sekciojn. Nia respondo al tiu demando povas esti mallonga : Jes, ni likvidu la agoniantajn kaj vegetantajn sekciojn, sed ne nur tiujn, sed krome ĉiujn aliajn kaj ankaŭ la landajn asociojn, sed ne antaŭ ol nia fincelo, la ĝenerala enkonduko de Esperanto, estos atingita. Sed ĝis tiam ni nepre devos daŭrigi la bataladon, kiel ajn seniluziigaj la rezultatoj de niaj laboro kaj peno ofte ŝajnas. Ne estas ja mirige, ke en periodo en kiu la ekonomiaj sekvoj de la mondmilito ankoraŭ grave sentiĝas kaj pluraj personoj kredas trian baldaŭan mondmiliton neevitebla, la homoj ne amase interesiĝas pri niaj kursoj kaj nia movado, kiu ja ankoraŭ grandparte estas idealisma. Hans Jakob, redaktoro de « Esperanto » skribis en siaj novjaraj pripensoj la. « La jaro 1950 anonciĝis kiel ĉiuj aliaj novjaroj. Oni formetis la malnovan jaron sen danko, aplaŭde akceptante la novan. Tiu ĉi optimismo, renovigata ĉiujare, estas la kuraĉlo kontraŭ la malbonaj spertoj travivitaj. Ni esperantistoj ankaŭ estas tiaj nevenkeblaj optimistoj. La multaj malbonaj spertoj, la seniluziigoj, kiuj jam ombris nian vojon, ne povas erarigi nin en nia firma konvinko pri la bono de nia klopodo. Ni penu kaj fidu ! » Jes, kial ni havu fidon, sciante, ke ne nur en nia lando sed ankaŭ eksterlande ni faris konsiderindajn progresojn en oficialaj rondoj, ke pluraj aŭtoritatuloj favoras nian movadon, ke Esperanto jam estas enkondukita kiel instrufako en pluraj lernejoj, seminarioj kaj universitatoj, ke ĉiam pli da periodaĵoj uzas Esperanton por atingi internacian legantaron kaj ke multaj radio-stacioj regule kelkaj eĉ ĉiutage elsendas en Esperanto ? Tiuj faktoj ja pravas, ke ni ne estu pesimismaj ; ke ni agas malprave, mezurante la far-ton de nia movado nur laŭ nia membronombro kaj ĝenerala manko de interesiĝo pri nia celado en niaj propraj rondoj kaj ĉe aluloj. Ni ne perdu la esperon ; la aktiveco de la oficejo « Esperanto ĉe la Instruado » ja rezultigis diversajn pozitivajn rezultatojn, niaj someraj kursoj en Kerk-Avezaath fariĝis granda sukceso same kiel la kongreso en Haarlem kaj niaj karavanvojaĝoj, kaj rezulte de nia interkonsento kun Flandra Ligo Esperantista ni povis oferi al niaj anoj grandformatan bonaspektan gazeton.

Ĉefestraro : La ĉefestraro konsistis en 1949 el la jenaj personoj : s-ro P. W. Baas (Amsterdam), prezidanto ; s-ro A. J. Kalma (Amsterdam), sekretario ; s-ro

P. M. Mabesoone (Amsterdam), kasisto ; f-ino H. M. Mulder (Badhoevedorp), 2-a kasistino ; s-ro F. Weeke (Den Haag), vic-prezidanto, s-ro W. H. Mook (Groningen), 2-a sekretario ; s-ro H. A. Appel (Bergen op Zoom) kaj s-ro C. E. Zondervan (Deventer). Okazis 4 ĉefestrarkunvenoj en 1949, nome 3 en Amsterdam kaj 1 en Haarlem. La adm. ĉefestraro kunvenis regule ĉiun duan semajnon escepte en la ferioj kaj kontaktis kun la aliaj ĉefestraranoj per cirkuleraĵoj leteroj. Kvankam ofte la prezidanto devis konstati, ke li vane elokventis, kvankam ia sekretario — redaktoro ofte ne ricevis respondon al siaj leteroj kaj oferis sian noktripozon por skribi adresojn kaj verki artikolojn por « Nederlandse Esperantisto », sciante, ke pluraj anoj forjetas la organon nelegita, kvankam la kasisto rompita al si la cerbon kiel ekvilibriĝi budĝeton, apenaŭ ekvilibrigeblan pro la fakto ke pluraj anoj simple ne pagis aŭ pagis multe tro malfrue, ili kaj la aliaj ĉefestraranoj penis kaj fidis...

Konsilantoj : En mia jarraporto pri la jaro 1948 mi skribis : « Jam la antaŭan jaron ni devis konstati, ke la konsilanta sistemo ne funkciis kontentige ! » En la pasinta jaro ĝi funkciis ankoraŭ pli nekontentige ol en 1947. » Kaj nun mi povas fini tiun « historian tragedian romanon » per la vortoj : La funkciado de la konsilanta sistemo atingis en la jaro 1949 la nulpunkton. Ne mirige do, ke la ĉefestraro proponos al la jarkunveno forstrekigi el la regularo paragrafon 19, kies valoro estas nur historia.

Sekcioj kaj membronombro : Bedaŭrinde mi povas menci nur proksimumajn ciferojn, ĉar la sekretario de sekcio « ie en Nederlando » evidente mem ne scias, ĉu lia sekcio ankoraŭ ekzistas aŭ ne kaj la sekretarioj de kelkaj sekcioj (Almelo, Dokkum, Hoogezand, kaj Wageningen) ĝis nun « forgesis » komuniki al ni la nomojn de la eksigintaj anoj, kvankam ili devus tion jam fari la 1-an de nov. 1949. Komence de 1949 nia asocio nombris 33 sekciojn. Aliĝis novaj sekcioj en Bozum kaj Eindhoven, sed likvidiĝis sekcio 't Zand, do se ne atingos nin pliaj sciigoj pri enterigoj, « okazintaj laŭ deziro de la mortintaj sekcioj en plena silento », la nombro je la jarfino estis 34. Kelkaj anoj eksigis, nepaginte la kotizon. Pro tio ni urĝe konsilas al la sekciaj kasistoj regule enkasigi la kotizojn komence de ĉiu kvaronjaro kaj ne atendi ĝis la jarfino. Kelkaj anoj perdis pro transloĝigo al « nekonata adreso ». Tio ne estus okazinta, se la sekretarioj ĝustatempe estus informintaj nin pri la adresŝanĝigoj.

La plimulto da sekcioj kunvenis regule ĉiun duan semajnon ; kelkaj eĉ ĉiusemajne. Aliflanke kelkaj sekcioj precipe la malgrandaj, kunvenis unu fojon en la monato, kelkaj neaktivaj grupoj nur kelkajn fojojn en la jaro kaj unu sekcio eĉ tute ne kunvenis. La sekciaj kotizoj varias inter 5 g. kaj 10 g. en jaro. Ofte la malgrandaj sekcioj, kiuj kunvenis ĉe la anoj hejme kaj ne bezonis ĉiufoje lui salonon, povis fiksi kotizon malaltan inter 5 g. kaj 6 g. Plej ofte la membroj pagis unu fojon en kvaronjaro, sed kelkaj sekcioj fiksis monatan, eĉ semajnan kotizon. Komprenibile ĉiuj tiuj aranĝoj varias laŭ la lokaj cirkonstancoj.

PROVINCOJ

Friesland : Leeuwarden regule kunvenis kaj la sekr. regule sendis al ni la sekciajn komunikojn. Ankaŭ Heerenveen regule kunvenis, sed kontraŭe, same kiel en 1948, Sneek tute ne kunvenis. Dokkum ne respondis. Nia « bebo » en Bozum ŝajnas vivipova kaj regule aranĝis studkunvenojn.

Groningen : Rezulte de la aranĝitaj kursoj Groningen rikoltis kelkajn novajn anojn kaj preparas sin por dece akcepti la nederlandajn esperantistojn je Pasko. La kunveno okazis regule. Veen-dam aranĝis pasintjare la regionan kunvenon, kiu bone sukcesis, sed la vigligo de la sekcio ŝajne estis nur portempa. Hoogezand ĝis nun ne respondis.

Drente : Assen sub devizo : « pli bone iam ol neniam » kunvenis unu fojon en 1949 sed tamen sukcesis aranĝi kurson. Ni esperu, ke post la kursfino kelkaj novaj adeptoj stimulos la sekcan vivon.

Overijsel : Por Almelo la jaro 1949 ne estis tre prospera kaj ĝis nun ni vane atendis respondon al nia demandaro. Same kiel Hengelo kaj Enschede (ĉu korekta, s-ro de Jonge ?) ĝi nepre bezonas freŝan sangon, sed kie trovi ĝin ? Deventer regule kunvenis, ĉefe dank' al la aktiveco de nia tiea ĉefestrarano.

Gelderland : Same kiel en 1948 Arnhem montris kontentigan aktivecon kaj regule sendis siajn komunikojn. Wageningen ne respondis kaj pri la farto aŭ nefarto de Culemborg ni povas nur diveni...

Noord-Holland : Amsterdam regule kunvenis kaj laŭ membronombro dum kelka tempo konkuris kun nia plej granda sekcio Leeuwarden. Sekcio Haarlem, kiu meritas nian dankon pro la bona aranĝo de la pasintjara kongreso, regule kunvenis kaj montris ĝojigan aktivecon, same kiel Hilversum. Ankaŭ en Den Helder oni regule kunvenis, kaj la klopodoj pri aranĝo de kurso meritis pli bonan sorton. Bergen nur vegetas : 't Zand post longa agonio fine mortis. Edam, kvankam negranda, ŝajnas vigla kaj regule kunvenis.

Zuid-Holland : Same kiel en 1948 niaj du sekcioj en Rotterdam, Merkurio kaj Espero, kaj la sekcioj en Den Haag kaj Leiden estis sufiĉe agemaj kaj la sekretariinoj de Merkurio kaj Den Haag regule sendis al ni ia sekciajn komunikojn, kiuj ofte atestis pri vigla sekcia vivo kaj kunvenoj kun allogaj programoj. Boskoop, kvankam malofta, ŝajnas nemortipova kaj sukcese aranĝis propagandkunvenon kun « Volksonderwijs ». Espereble post nelonge ni povos saluti novan sekciojn en Delft ; klopodoj pri starigo de sekcio en Dordrecht ĝis nun restis sensukcesaj.

Utrecht : Same kiel en 1948 ni nur malofte ricevis informojn pri la sekcia vivo en Utrecht. Tamen oni regule kunvenis, same kiel en Zeist, kie oni en kunlaboro kun aliaj lokaj sekcioj aranĝis bone sukcesintan propagandvesperon. Amersfoort restis malforta sed tamen vigla.

Noord-Brabant : En Bergen op Zoom kaj Breda la situacio restis proksimume la sama. Eindhoven, kvankam ankoraŭ malforta, montris laŭindan aktivecon.

Zeeland : Ĝis nun la sekretariino de nia sekcio en Vlissingen ne respondis. Laŭ membronombro la sekcio iom kreskis.

Limburg : Sekciojn ni ne havas en tiu provinco ; nur kelkajn ĝeneralajn anojn.

(daŭrigota)

ESPERANTO EN VREEMDELINGENVERKEER

In « V.V.V.-nieuws uit Eindhoven en Kempenland » (Jan-Febr. 1950) laven we een goed artikel « Esperanto, de simpele oplossing voor een moeilijke probleem » van dr W. J. A. Manders, met een bijschrift, waarin de redactie meedeelt, dat Esperanto in haar orgaan in 't vervolg vaker zal worden gebruikt om buitenlanders in te lichten omtrent wetenswaardigheden van Eindhoven en omgeving. Dit resultaat zal vermoedelijk wel mede het gevolg zijn van het werk van de kleine afdeling aldaar, die wat activiteit en samenwerking met andere plaatselijke organisaties betreft, een goed voorbeeld geeft aan andere grotere afdelingen. Wij wekken de afdelingen graag op, om contact te zoeken met plaatselijke verenigingen voor Vreemdelingenverkeer, opdat steeds meer gidsjes en folders, geheel of gedeeltelijk in Esperanto geredigeerd, zullen verschijnen. Men zorge er ten minste voor, dat het adres van de plaatselijke consul van U.E.A. in dergelijke uitgaven wordt vermeld. Eenzelfde activiteit is wenselijk bij de uitgave van gidsjes of programma's van internationale tentoonstellingen, enz. Een goed voorbeeld gaf o.a. mevr. B. M. Slösser-Bresler, die een artikeltje « Esperanto en Philatelie » schreef voor de tentoonstellingsgids van de afd. Soest van de intern. veren. « Philatelica ».

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

Akiras PREMION post n-roj 75-76 : S-ro Vandeplyte L., el Gent, (101 p.), por Fl.L.E. :

SOLVOJ.

N-ro 77. *Horiz.* 1. sia ; alt. 2. eldon ; ripar. 4. paper ; spron. 5. ost. 6. ok ; al/el. 7. tirkest. 9. azeno ; triki. 10. kor. 11. terpomo.

Vert. 1. senprokrast. 2. il. 3. adapt ; est. 4. pian. 5. anaro ; okr. 6. sekv ; op. 7. frost ; tro. 8. estr. 9. apart ; ido. 10. la. 11. translogiĝi.

N-ro 78. *Horiz.* 1. pas ; ade. 2. ostro ; tusad. 4. tendo ; ŝargi. 5. kre. 6. fi ; pl. 7. memstar. 9. ident ; ekran. 10. reg. 11. acetant.

Vert. 1. poŝtovicist. 2. as. 3. stang ; ema. 4. tern. 5. rokok ; tre. 6. risk ; et. 7. ataŝe ; ega. 8. ŝark. 9. asert ; ret. 10. da. 11. edziniĝinta.

N-ro 79 : KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. prefikso ; lumigilo (R) ; korpopto (R). 2. en ĝi oni komforte sidas (R) ; proksima (R). 3. eltiri (R) ; iama regnestro (R) ; nombro. 4. malsano (R) ; besto (R). 5. prepozicio ; kortbir- do (R). 6. havantaj komunan centron (R). 7. subteni per monaj rimedoj (R). 8. militiste ordoni (R) ; domoparto (R). 9. pravigita povo fari aŭ postuli (R) ; interpunkcia signo (R). 10. publike rekomendi komercaĵon (R) ; farita per homa faro, sed ne kreita de la naturo

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12

1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											
12											

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. Afdeling Brugge. — Buiten de wekelijkse vaste programmapunten was er in Januari afwisseling door een zeer gewaardeerde vergadering gewijd aan denksport. De 2 partijen (allen groepsleden) gaven elkander weinig toe. Op algemeen verlangen hield de sekretaris nog eens een spreekbeurt over « La Psikoteknikaj testoj en la Belga armeo ».

De huwelijks-epidemie in onze groep ging voort met ges-roj R. Lauwers-Maertens en A. Maréchal-Th. Roose. Dit laatste is reeds het zevende huwelijk in onze vereniging waarvan de 14 slachtoffers lid zijn. Verdere plannen : het geven der jaarlijkse feestavond voor de ouders en leden en organiseren van een hypnotismeavond voor het publiek.

V.E.B. Afdeling Brussel. — Het jaarlijkse Zamenhoeffest van de Brusselse Esperantisten werd een groot succes. Al de Esperantisten-verenigingen van de hoofdstad hadden hun beste beentje voorgezet om tot het welslagen van die avond bij te dragen. Zaterdag 17 December was dan ook een heuglijke dag voor al de Esperantisten hier ter stede.

V.E.B. Afdeling Mechelen. — Op 11/1 werden de E. raadsels gemeenschappelijk opgelost ; op 18/1 voegde Dr Th. Van Gindertaelen het woord over het probleem van de woordvorming in Esperanto ; spreker belichtte de techniek ervan door de ontleding van de toepassing van verscheidene voorvoegsels ; op 25/1 leidde de heer Van Peteghem onze gebruikelijke zangavond. Programma Februari : 1/2 - enigmoj ; 8/2 - Letervespero ; 15/2 - Esperantospreekbeurt « Hispanidaj neologismoj » door Dr Th. Van Gindertaelen ; 22/2 - zangavond. Ons jaarlijks feestje met bal zal worden gehouden op Zaterdag 12/2 in « De Drie Peerdekens ». Iedereen is welkom.

V.E.B. Afdeling Oostende. — Ons Kerstfeest werd gehouden op 25-12-49 ; er vond een kerstsouper plaats met tombola voor de kerstverrassing. Vervolgens werd er gedanst tot 2 uur. Op 11/1 kwamen de leden van het Congrescomité bijeen en beslisten over de aanmeldingsformulieren en stelden een voorlopig programma vast ; op 18/1 vond onze jaarlijkse statutaire vergadering plaats met de herkiezing van het Bestuur. Waren uittreedende bestuursleden S-ro Dhaenens, Voorzitter, Vice-voorzitter ; Mej. Vermeiren, Bibliotheek ; Vanneste, Penningmeester en Van Elslande, propagandist.

(R). 11. ludkarto (R) ; ĝuste antaŭ nun ; sufikso (R). 12. ŝmiri per miksaĵo de kalko kaj sablo (R) ; li prizorgas la publikan ordon (R).

Vertikale. 1. rapide pasanta (R) ; grupo de homoj kun la sama deveno kaj propraj heredaj karakteroj (R). 2. korpopto (R) ; ne ĉeesti (R). 3. malagrabla sento antaŭ danĝero (R) ; ĝi manĝas salaton (R) ; 4. manĝebla vegetaĵo (R) ; per ili oni fermas keston (R). 5. flanko de konstruaĵo (R) ; ĝi revenas post ĉiu strofo (R). 6. koloro (R) ; brui kiel marondoj (R). 7. oni bezonas ĝin por solvi la enigmon (R) ; konjunkcio. 8. luksa domo (R) ; de ĉiu speco. 9. ne makulita (R) ; samfamilianoj (R). 10. posteulo (R) ; granda vazo (R) ; ĝi rakontas pri antikvaj dioj (R). 11. tre peza metalo (R) ; meblo (R) ; sin movi (R). 12. unu el niaj manoj estas tia (R) ; arbo (R).

N-ro 80 : ŜAJNAN SUFIKSON ALDONU

al radiko respondanta al la unua difino, por trovi vorton respondanta al la dua.

Aldonu ADO : 1. amuziga kunveno ; poeziaĵo. 2. unupeca maso ; ĉirkaŭsiĝado. 3. vegetaĵo aŭ ties grajno ; municio. 4. kapŝirmilo ; akvofalo. 5. aro de du estuloj ; pompa elmontrado.

Aldonu ERO : 1. tenilo ; kortobirdo. 2. imiteblaĵo ; reproduktitaĵo. 3. insekto ; manĝilo. 4. organika fluaĵo ; dolĉaĵo. 5. senviviĝo ; kunigilo ĉe konstruado.

Aldonu INO : 1. difinita aparta okazo ; monduma amuzejo. 2. sinsekvo de harmoniaj sonoj ; butiko por personoj loĝantaj en la sama establaĵo. 3. buketo formita per trikado ; aparato plifaciliganta homan laboron. 4. mallonga subskribo ; vaksosimila substanco. 5. travidebla substanco ; elmontra ŝranko.

Aldonu ONO : 1. vegetaĵo kun dika radiko ; substanco uzata ĉe konstruado. 2. mezklasulo ; ŝvelaĵo ĉe vegetaĵo. 3. floro ; muzikilo. 4. korpopto ; divido de presita paĝo. 5. enspezo de eksiginta oficisto ; speco de malgranda hotelo.

La solvojn sendu Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, kaj la nederlandanoj al S-ro Teunissen, Legmeerstraat, 37, A-1, Amsterdam-West, antaŭ la 20.2. 1950.

ANONCETOJ

Germanaj samideanoj pretas pagi vojaĝelspezojn en Germanujo por esperantistoj el aliaj landoj aŭ gastiĝi ilin dum la germana Esperanto-kongreso en Mainz je Pentekosto 1950 aŭ je alia tempo, kontraŭ reciproka servo. Por ĝustatempa arango oni interkontaktu baldaŭ kun germana Esperanto-Centro, (13b) München-Pasing, Engelbertstr. 7, aldonante respondkuponon.

Al Finnlando kun dana E-ista karavano 26-7 — 10-8. Detalajn informojn sendas L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Danlando.

Pro subita forlro al Brazilo, kore salutas slajn esperantajn geamikojn : *Ruilto van Puiten*, Evertsenstraat, 13 - Loosduinen (Hago). Se ili havas deziron pri Sud-Ameriko skribu kaj li respondos laŭpove ; Av. Atlantica, 784 ap. 2 Copacabano D.F. Rio-de-Janeiro.

Se vi serĉas germanan korespondanton mendu dulinian anoncon en la germana E-gazeto « La Ponto » je favora prezo de 5 resp. kup. Adreso : München-Pasing (13 b), Engelbertstr. 7 Germanio.

Se vi deziras ekkoni la literaturon kaj naturon de ISLANDO kaj la vivkondiĉojn de la Islanda popolo, abonu la novan Esperanto-gazeton VOĈO DE ISLANDO. Ĝi aperas kvaronjare. Jara abono kostas 2.75 guld. Mendebila kaj pagebila ĉe F.ino M. H. Vermaas, Nwe Binnenweg 70, Rotterdam, ĝirkonto : 333790, kie spejmenaj ekz. estas haveblaj, aŭ rekte ĉe la eldonanto por 12 resp. kup.

Federacio de Islandaj Esperantistoj, Poŝtkesto : 1081, REYKJAVIK, Islando.

Cu vi jam posedas la jarlibron U.E. A. ? Mendu ĝin ĉe Fr. Couwenberg, Blankenberge ĝirante : 35 b. Fr. je lia p.ĉk. 416135 !

Aliĝu al la Germana Esperanto-Kongreso — Mainz, 27-an de majo-2-nde junio 1950. Direktu vin al la Esperanto-Grupo, Boppstrasse 9, Mainz (22b) Germanujo.

Niaj Kongresoj

XV-a Kongreso de Fl.L.E. Pentekosto 27 - 28 - 29 de majo 1950

OOSTENDE

Dua Komuniko

Konsisto de la Komitato :

Gesanoj Dhaenens, Maeschalk, Clauwaert, Maene, Vermeire, Vanneste Gallet kaj Decaesteker.

Skribu al : S-ano Maeschalk, Muscarstraat 2.

Pagu al : S-ano Clauwaert, Waterwerkstraat 20. P.C.K. 485057.

Kongreskotizo : 40 fr. po persono ; por junuloj malpli 18 jaraj : 25 fr.

NI INSISTE PETAS KE ONI JAM DE NUN GIRU LA KONGRESKOTIZON. KONGRESAJ GLUMARKOJ : 20 fr. po 100 ĉe la sekretario Maeschalk.

PROPAGANDU ESPERANTON PER TIUJ GLUMARKOJ

Apartaj kunsidoj : Tlucele la L.K. disponigas ejojn. Oni turnu sin al la Prezidanto de la K.K. Bouwmeesterstraat 7.

OOSTENDE

A. Historio (daŭrigo)

1394 kaj 1404 du egaj akvosuperfluoj detruis grandparte la duonojn kaj la urbon. Finfine en 1445 duko Filipo de Burgundio donis rajton konstrui novan havenon flanke de la malnova urbo.

Tiu haveno situis okcidente de la urbo kaj ĉirkaŭaj domoj kaj stratoj estis laŭ plano konstruataj kaj ne hazarde, unu post la alia kiel okazis pli frue. Nun venis la unua prospera periodo de Oostende.

Je la fino de la 16a jarcento, — flu terura epoko de la religimilitoj sub hispana regado — Oostende estis siegata kaj grandparte detruata. La duonoj norde de la urbo estis traborataj kaj la urbo estis denove insulo. Post konkero de Oostende oni decidis tuj fari novan havenon ne sur la antaŭa loko, sed nord-okcidente, do tie kie estis la unua haveno, kaj tie kie ĝi estas hodiaŭ.

Dum la 18a jarcento Oostende estis igonta tre fama kaj tre grava per la Oostenda kompanio por la komerco kun la malproksima oriento. Sed, malfeliĉe tiu komerca kompanio nur daŭris dum 5 jaroj !

Ĉirkaŭ 1780 la Aŭgustia imperiestro Jozefo IIa (de post 1713 nia lando apartenis al Aŭstrujo) deklaris Oostendon « libera haveno » kaj tre multaj ŝipoj de la militantaj landoj vizitis ĝin tiel ke la haveno disvastiĝis ĝis la terpeco nun nomata « hazekwartier » (leporokvartalo). Multegaj fremdlandanoj tiam loĝis en Oostende. Do antaŭ la deknaŭa jarcento la disvastiĝo de la urbo okazis laŭlonge de la kanalo al BEUGGE, sed de post tiam ĝi okazas laŭlonge de la marbordo kaŭze de la intensigo de la turismo. Efektive Oostende iĝis la « reĝino de la banlokoj ».

(daŭrigota)

Drs. F. ROOSE

Hoekje van de Penningmeester

Laatste

Waarschuwing.

We zijn reeds de tweede maand van ons bondsjaar ingetreden. Nog een groot aantal getrouwen hebben hun cotisatie voor 1950 aan de Vlaamse Esperantisten Bond niet betaald. Wij rekenen stellig dit verzuim spoedig te zien goedmaken. De ontvangkaarten worden binnen een paar dagen aan het Postbestuur overhandigd, bespaar ons het werk en die nodeloze onkosten. Schrijf onmiddellijk over op P.C.R. 232150, V.E.B. Brussel ; de bijdragen, wij herhalen het nog eens : Lid-zijn : 75 frank ; Inwonende leden (met De Esperantist) betalen slechts 25 frank. Steunende leden, minimum 150 frank.

Noteer dat de jongeren volgende verminderingen en voordelen genieten : tot 18 j. (F.E. en La Juna Vivo) 50 fr. tussen 18-21 jaar (F.E.) 50 fr.

EL BRAZILIO

Almada S-ino F.S. Santos. 150 fr. Dankon.

XVII-a Kongreso de la Nederlanda Esperanto-uniigo.

« La Estonto Estas Nia »

La kongreso okazos en Groningen la 8an, 9an kaj 10an de aprilo 1950. La kongreskotizo estas antaŭ la 1-3, g. 2.75 ; antaŭ 1-4, g. 3 ; post la 1-4, g. 3.25.

La prezoj por la komuna lunĉo kaj festmanĝo estas g. 1,75, kaj g. 2,25 (inkluzive de trinkmono).

La prezo por la ekskurso de la 10-4 tra Groningen kaj ĉirkaŭaĵoj, estas g.2,25 ; la varma lunĉo kostas g. 1,75.

Anoncu vin plej baldaŭ kaj mendumu hotelĉambron aŭ gastloĝadon ĉe privatuloj ĉe la Sekr-ino : S-ino L. de Vries-Kanning, Witte de Withstr. 25, aŭ ĉe la kasisto S-ro H. Albers, Ernst Casimirlaan, 1-a tel. 20604, kasisto, ĝiro 536911.

Fl. L. E.

VARBKONKURSO.

Jen la kompleta premio-listo :

I. Por la premiota sekcio : Ĉeĥoslovaka antologio.

11 Individuaj premioj :

1. Senpaga restado en eksterlanda Esperanto-arango.
2. Senpaga restado en nia kongreso en Oostende.
3. Sep Fratoj, de Kivi (360 paĝoj).
4. Abono 1951 je « Esperanto » de U.E. A.
5. Gosta Berling, de Selma Lagerlöf (552 paĝoj).
6. Surprizoj, de I. Boudier-Bakker (208 p.)
7. Tipoj & aspektoj de Brazilio (152 p.)
8. Romano pri Afrika Bieno de O. Schreiner (270 p.)
9. Pinokjo, C. Collodi (150 p.)
10. Pli ol fantazio, A. Bogh-Hogsted (74 p.)
11. Paul Nylen (64 p.)
12. 50 poŝtkartoj.
13. Jozef en Dotan (82 p.)
14. Insigno.
15. 50 glumarkoj.

La loko de la varbantoj en la konkurso ĝis la fino de Januaro estos per aparta cirkulero komunikata.

NOVAJ SEKCIOJ :

« Daar roert entwat » en la marborda provinco ! Ĝis nun la ligo povis tie apogi je 3 sufiĉe fortaj sekcioj -fortaj, ĉar ili almenaŭ entreprenis(as) la organizaĵon de kongreso — aldoniĝis unu, Ize-gem, kaj samtempe anoncas novan kurson kaj unuajn kunvenojn, niaj kernoj en Roeselare kaj Kortrijk. Se ni statistike lokigas niajn sekciojn jene : Provinco : Antwerpen 2 sekciojn Brabant 2 sekciojn Limburg — Oost-Vlaanderen 1 sekciojn - 1 kernon (Aalst) West-Vlaanderen 4 sekciojn - 2 kernojn

tiam ni konstatas ke en la lasta provinco la Esperantistoj certe estas la plej bone organizitaj, kvankam la nombro tute ne estas la plej granda. Per la esprimo « kerno » ni komprenas kelkajn geliganojn kiuj estas grupigitaj ĉirkaŭ reprezentanto, kaj kiuj foje kunvenas, kaj planas la fondon de sekcio.

En kelkaj aliaj lokoj ekzistas tamen ankaŭ eblecon grupigi la geliganojn, kaj aktivigi nian lokan movadon. Ni nur citas : Ronse kaj Turnhout. En tiuj du lokoj ni fidas je la reprezentantoj, respektive S-anoj J. Cantart kaj Meyvis, kiuj kaptu la okazon de la varbkonkurso, por pligrandigi unuavice la nombron de la liganoj kaj amikoj tie, kaj samtempe plifortigi la bazon de estonta grupo.

via sekretario.

Abonu la internacian — ree aperintan — monatun revuon « Esperanto Katolika ». Giru la jaran kotizon de 60 Fr. al A. Beckers, Overpelt-Fabriek (p.ĉ. k. n° 4217.34.)

Verantw. uitgever : Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij : J. Van Laer, Korte Begijnstraat 38, Turnhout.